Arĝenta Filiko

ISSN 1176-418X
6-monata Bulteno
de Nov-Zelanda
Esperanto-Asocio

Numero 24 Septembro 2007

Aŭklando promesas varman kongreson

En Meksikio, oni kutime diras ke, se pluvas en Akapulko (varma feria loko ĉe la Pacifika marbordo), turistoj ne devos pagi sian hotelĉambron. En Nov-Zelando, ni faras preskaŭ la saman promeson: ni ne redonos al vi vian monon, sed ni certe promesas varmsomeran kaj interesan kongreson en Aŭklando.

Datoj

La Oceania Kongreso komenciĝos la 14-an de januaro 2008. Se vi volas mendi flugon al Aŭklando, indas scii ke la solena malfermo komenciĝos je la 1.30ptm. Tial, se vi volas, vi povos alveni la matenon de la 14-a. La kongreso daŭros naŭ tagojn ĝis la 23-a de januaro (la solena fermo okazos je la 1.30ptm).

Kongresejo

La kongresejo estos la St Francis Retreat Centre kiu situas inter la flughaveno kaj la urbcentro (proksimume je 10 minutoj aŭtomobile de la flughaveno kaj 15 minutoj de la urbcentro).

Pro la fakto ke la kongresejo estas eksa monaĥejo, estas dormĉambroj kun nur unu lito (nur por unu persono). Tamen, se vi preferas, eblas mendi plur-personan ĉambron ĉe apudaj hoteloj (la loka

kongresa komitato povos helpi pri la mendado de hotelĉambroj).

Programo

Dum la kongreso ni ofertos kursojn je tri niveloj:
- komencantoj (instruos Katja Steele)
- meznivelanoj (instruos Stano Marĉek el Slovakio, redaktoro de *Esperanto*)
- progresintoj (instruos Trevor Steele)

Kursoj okazos dum sep el la naŭ tagoj de la kongreso. Krom kursoj, dum la kongreso okazos tuttaga ekskurso al kampara regiono kaj regiona parko apud Aŭklando kaj du duontagaj ekskursoj al montaro apud Aŭklando kaj al tradicia maoria domo kun tipa maoria manĝo (hangi). Okazos ankaŭ distraj vesperoj, debatoj, bankedo, teatraĵoj.

La Oceania Kongreso estos kuna kongreso de NZEA kaj Aŭstralia Esperanto-Asocio, kaj certe okazos dum la kongreso oficiala jarkunveno de NZEA.

Loka propagandado

La Oceania Kongreso estos grava okazo por diskonigi Esperanton al Nov-Zelandanoj. Ni intencas skribi al lernejoj en Aŭklando kaj anonci en lokaj tagĵurnaloj. Ni jam parolis kun TVNZ (Televido Nov-Zelanda) kaj ni esperas ke oni volos fari raporton pri la kongreso.

Internacia etoso

Ni intencas vaste propagandi pri la Oceania Kongreso por allogi samideanojn el la tuta mondo. Ni jam metis anoncojn en diversaj retpaĝoj, skribis al landaj asocioj kaj mendis anoncojn en internaciaj gazetoj. Tial, ni atendas vere internacian etoson. Ĝis nun aliĝis diversaj esperantistoj el Aŭstralio kaj ni esperas bonvenigi aliajn kongresanojn almenaŭ el Japanio, Eŭropo kaj Nov-Kaledonio – sed certe venos kongresanoj el aliaj

landoj. Plie, ni ĝojas pro la fakto ke altkvalitaj kaj lertaj Esperantistoj instruos dum la kongreso.

Pro tio, ni kredas ke la Oceania Kongreso estos granda evento por ni en Nov-Zelando kaj ni esperas ke multaj el niaj membroj povos ĉeesti.

- David Ryan

2008 Annual General Meeting /

2008 Jarkunveno de NZEA

The 2008 annual general meeting of NZEA will take place at the St Francis Retreat Centre, Hillsborough, Auckland over two sessions starting at 3.30pm on Saturday, 19 January and Sunday, 20 January 2008.

La venonta jarkunveno de NZEA okazos ĉe St Francis Retreat Centre, Hillsborough, Auckland en du sesioj je 3.30pm sabaton, 19-an de januaro kaj dimanĉon, 20-an de januaro 2008.

News and thoughts about Esperanto postcards

The publishers of the monthly magazine "Eventoj" recently announced that a "Virtuala Ekspozicio de Esperantaj Bildkartoj" containing 1417 Esperanto postcards may be viewed online. The cards are classified in two ways according to country of origin and by categories. The categories are:

Esperanto arrangements such as congresses, courses, famous Esperantists, Esperanto slogans and sayings, cards promoting Esperanto in Esperanto, cards promoting Esperanto in other languages, religious cards, towns, countries and places, greeting cards, miscellaneous, and ZEO-j.

ZEO-j are places, statues and other things honouring Zamenhof or Esperanto. We have one ZEO in New Zealand - an Esperanto Street in Papatoetoe, Auckland, but we have no Esperanto postcard. I hope that our NZEA executive will consider producing one in time for the Oceania Congress in January.

I have had scores of Esperanto correspondents and many of these have sent me Esperanto postcards. I have also found a few in stamp shops including my oldest Esperanto postcard sent to a New Zealand Esperantist from the sixth Universal Esperanto Congress in Washington in 1911. It shows a picture of the Washington Monument that was then the world's highest monument

In 1963 S-ino Betsy Harvey of Wellington invited Esperantists to send her postcards to display at the NZEA conference to be held at the end of 1963. She received 130 or more cards mostly from Europe but also from USA, South Africa and the Channel

Islands. Many were ordinary picture postcards with greetings in Esperanto but many were Esperanto postcards as defined above.

The most interesting shows four buildings with greetings from Esperanto Day in Szolnk 30 June, 1963. On the other side is a message signed by Julio Baghy, the famous Hungarian poet.

"The History of Esperanto in New Zealand" Book 2 has a report written by Betsy Harvey as Information Officer in 1964 but she is not mentioned in later years. If anyone knows anything about Betsy Harvey since then, please let me know.

I have 17 Esperanto cards of my own and eight from the Betsy Harvey collection which I cannot locate in "Virtuala Ekspozicio de Esperantaj Bildkartoj". I will soon scan them and send them to "Eventoj".

Visit
http://www.eventoj.hu/bildkartoj/index.htm

- Gwenda Sutton

Above: Postcard number bk0845 from the UK, year unknown.

Tradukante en Esperanton preter tre baza lingvonivelo, aŭ eĉ korespondante, oni konstante ĉagreniĝas pro la manko de sufiĉe da ampleksaj vortaroj kaj vortlistoj anglaj-Esperantaj. Estas temporabe serĉi vortarojn kaj retejojn por fidindaj tradukoj de vortoj kaj frazoj kiuj nepre troviĝas en ĉiu nacilingva-fremdlingva vortaro.

Helpo venas, tamen. *Vortaro angla-Esperanto*, aktuale kompilata ĉe “http://eo.wiktionary.org/wiki/Vortaro_angla-Esperanta”, iam enhavos la plenan vortprovizon de ordinara referenca vortaro de la angla. Ĝi havos plian avantaĝon, nome ke ĝi estos konstante ĝisdatigata, vastigata kaj korektata.

Kvankam preskaŭ la sola kompilanto ĝis nun estas NZEA-ano Mike Leon, iu ajn rajtas kontribui al la vortaro kaj tiel pliigi ĝian utilecon al tutmonda uzantaro.

- *Mike Leon*

Vizito al dulingva Kanado

Dum julio mi vizitis Montrealon kiu estas la plej granda urbo de la kanada provinco de Kebekio kaj ankaŭ la plej granda franclingva urbo ekster Francio.

Multaj ofte pensas ke Kanado estas tute anglalingva lando kun nur malgranda, preskaŭ folklora, franclingva loĝantaro. Tamen, laŭ la popolnombrado de 2001, 23% de la 30 milionoj da kanadanoj diras ke la franca estas sia denaska lingvo. Tamen, en la provinco de Kebekio la franca estas denaska lingvo de pli ol 80% de la loĝantaro. Fakte, 13% da kanadanoj diras ke ili parolas nur france – ili ne scipovas la anglan lingvon malgraŭ la fakto ke ili estas ĉirkaŭataj de preskaŭ 300 milionoj da anglalingvanoj en la nordamerika kontinento.

Ni ne forgesu ke antaŭ kvar jarcentoj la francoj kaj angloj kune fondis Kanadon. Pro militoj kaj aliaj eventoj, la angloj ‘venkis’ sed la francoj restis en Kanado. Kelkaj elmigris al Luiziano en Usono. Angloj vojaĝis al multaj aliaj partoj de Kanado, dume la francoj restis plejparte en Kebekio. Nuntempe, la franclingva loĝantaro (denaskaj franceparolantoj) estas sufiĉe granda, iom pli ol 7 milionoj. Proksimume 85% de franclingvanoj en Kanado loĝas en la provinco de Kebekio aŭ ne tre for, najbare al la provinca landlimo. Aliaj franclingvanoj loĝas dise en aliaj provincoj.

Kanado estas oficiale dulingva kaj leĝoj protektas dulingvismon. La registaro ofertas tutlandajn televid- kaj radiostaciojn en la du lingvoj, varoj portas dulingvajn etiketojn, komercoj ĝenerale reklamas en la du lingvaj kaj, eĉ kiam oni telefonvokas al la kanada ambasadorejo en Wellington, la respondmaŝino parolas dulingve. En politikaj aferoj, anglalingvaj politikistoj

ofte lernas la francan lingvon, kaj debatoj en la parlamentejo okazas ambaŭ en la angla kaj la franca lingvo. Por ĉefministroj, bona scio de la franca lingvo estas preskaŭ deviga. Fakte, en la historio de Kanado, multaj ĉefministroj kaj aliaj altranguloj (ekzemple militaj kaj burokrataj estroj) estis franclingvanoj.

Ĉu la franca lingvo havas promesplenan estontecon en anglalingva kontinento? Franclingvanoj kiuj loĝas ekster Kebekio trovas ke estas pli malfacile konservi la lingvon ĉar ne estas multaj franclingvaj lernejoj, komercoj, preĝejoj ktp. Ekzemple, en la provinco de Brita Kolumbio kun loĝantaro de preskaŭ 4 milionoj, en 2001 estis nur 54,000 denaskaj franclingvanoj - sed 308,000 denaskaj parolantaj de la ĉina lingvo!

Tamen, en la provinco de Kebekio la afero estas multe pli favora por la franca lingvo. En Kebekio, pli ol 80% de la loĝantaro estas denaska franclingva, proksimume 10% anglalingva, kaj aliaj parolas diversajn lingvojn (multe parolas la hispanan). Anglalingvanoj loĝas ĉefe en Montrealo sed, ekster tiu urbo, la provinco estas preskaŭ 100% franclingva. Ekzemple, en la provinca ĉefurbo, Kebeko, 99% de la loĝantaro estas franclingva.

Ĝis antaŭ 40 jaroj la franca estis kiel dua-grada lingvo en Kebekio. Anglalingvanoj estis pli influhavaj kaj malnovaj fotoj de Montrealo montras ke multaj surstrataj komerc-signoj estis anglalingvaj. Dum la 60aj kaj 70aj jaroj, tamen, okazis ‘trankvila revolucio’ en Kebekio. Franclingvanoj gajnis pli da rajtoj por la franca lingvo kaj ili eĉ elektis partion al la provinca registaro kiu fortigis eĉ pli la francan lingvon (ekzemple per deviga lernado de la franca lingvo eĉ por anglalingvanoj). En 1980 kaj 1995 okazis referendumoj

por decidi ĉu sendependigi Kebekion de Kanado. Tiu de 1995 preskaŭ sukcesis: 49.4% de kebekianoj voĉdonis favore al sendependigo. Tiuj kiuj volas ke Kebekio ne plu estu parto de Kanado diras ke la nacia registaro ne sufiĉe protektas la francan lingvon, Kebekio havas tute apartan identecon, kaj la franca lingvo pli sukcesos se ĝi estas la nacia lingvo de aparta nacio. Verŝajne, lastatempe sendependeco ne estas tiom preferata, eble pro la fakto ke la situacio de la franca lingvo estas nun multe pli forta kaj pro timo de ekonomiaj riskoj se Kebekio ne restas parto de pli granda nacio.

Tamen, kian estontecon havas la franca lingvo en ĉefe anglalingva lando? Verŝajne ne ekster Kebekio kie la angla estas la ĉiutaga lingvo en la lernejo kaj laborejo sed, en la provinco de Kebekio, estas ankoraŭ milionoj da personoj kiuj restas franclingvanoj.

Grava influo estos la enmigrado. La loĝantaro de Kanado kreskas ĉar alvenas multaj enmigrantoj el diversaj landoj. Multaj tute ne parolas la francan lingvon kaj, pro tio, ili preferas ekloĝi ekster Kebekio. Pro tio, la influo de Kebekio kaj la franca lingvo en Kanado pli kaj pli malgrandiĝas. Ankaŭ, la ekonomia influo de ĉefe franclingva Montrealo (kiu estas la dua urbo de Kanado) plimalgrandiĝas ĉar multaj firmaoj translokiĝas al la plej granda urbo, Toronto.

Eĉ en franclingva Kebekio, risko por la franca lingvo estas enmigrado. Enmigrantoj ĝenerale venas el ne-franclingvaj landoj kaj, kvankam preskaŭ ĉiuj infanoj devas studi en franclingvaj lernejoj laŭ kebekia leĝo, ili devas paroli france en la klasĉambro sed ili emas paroli angle surstrate kaj ekster la klasĉambro. Enmigrantoj kies denaska lingvo estas la hispana aŭ portugala pli facile adoptas

la francan – la franca por ili estas pli facila ĉar ĝi similas al la hispana aŭ portugala – sed enmigrantoj el aliaj landoj (nun multaj enmigrantoj venas el aziaj landoj) preferas lerni kaj vivi en la angla lingvo, kiun ili verŝajne lernis en la hejma lando kaj por faciligi postan translokiĝon al aliaj partoj de Kanado. La oficiala rezulto de la popolnombrado de 2006, kiu publikiĝos en decembro ĉi-jare, montros pli ĝisdatan situacion de la franca lingvo en Kanado, kaj precipe en franclingva Kebekio.

Fine, pri Esperanto en Kebekio: dum mia vizito al Montrealo, mi renkontis samideanojn kiuj diris ke 50-100 personoj ĝenerale ĉeestas klubkunvenojn. En julio 2008 okazos tut-amerika kongreso de Esperanto en Montrealo.

- David Ryan

Karaj legantoj!

Via redaktoro urĝe petis al mi materialon por la *Arĝenta Filiko*. Do, jen estas kvizo, kiun mi preparis kiel revizio por komencantoj kaj eternaj lernantoj, ekzemple kiel mi, en la aŭklanda grupo. Ĝuu, sed ne atendu la solvojn de mi! - *Howard Gravatt*

Plena da simplaj kaj. teruraj eraroj

Mi enmetis 25 elementajn kaj terurajn erarojn en la subaj frazoj. Eble estas pli. La kleruloj vere informos nin! Iuj ne tiom simplaj! Estu avertita, mi ankaŭ enmetis kelkajn "ruĝajn haringojn".

Frazo **Numero da eraroj**

1. Ne forgesu via akusativo. _____
   (Sube, skribu la korektan version de la frazo)

_____

2. Mi ĵus skribis la leteron kun krajono. _____

_____

3. Mi suposas ke li venos. _____

_____

4. Mi atendis la kunvenon sur sabato. _____

_____

5. Li metis la akĉenton sur la rajto vorto. _____

_____

6. La malbela eta knabino fariĝis belan virinon. _____

_____

Frazo **Numero de eraroj**

7. Mi legis la Anglan version en Septembro. _____

_____

8. Mi lernis lin obei la signo. _____

_____

9. La frazoj estas plena de eraroj. _____

_____

10. Ni mangis la freshan fishon. _____

_____

11. Ŝi skribis la leteron “k” sur ŝia papero. _____

_____

12. Ĝi pluvis multe de la tempo. _____

_____

13. Ĉu li estas la villaĝa idioto? _____

_____

14. Ŝi mankas veran belecon. _____

_____

15. La infano kaj la adulto estas feliĉa. _____

_____

Sume: 25 da eraroj. **Via rezulto:____**